# *Konstatas José Ramón Machado avancojn de la kuba sansistemo.*



Havano, 26 feb (RHK) La dua sekretario de la centra komitato de la komunista partio kaj vicprezidanto de la ?tata konsilantaro kaj de ministroj de Kubo, esprimis sian kontenton pro la evoluo de la kuba sansistemo kaj la proponataj projektoj.

La vicprezidanto ?eestis la jaran bilancon de la ministerio pri publika sano, kie oni taksis ke la jarasembleo 2017 evidenti?as kiel tre bona, kio konstateblas per tiu ?i bone organizita programo, kaj la metodologia kunsido preparita por la municipaj direktoroj, kio ebligis taksi la ?efajn avancojn, mankojn kaj defiojn cele al la nuna kaj estontaj jaroj.

Dum la kunsido, la ministro pri publika sano, Roberto Morales, emfazis la bezonon rehavigi la fondajn principojn de la programo Kuracisto kaj flegistino de la familio, kreita de la ?efkomandanto Fidel Castro, cele al plifortigo de la baza atento, kun emfazo en la agadoj por impulsi la sanon kaj preventi malsanojn.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/156052-konstatas-jose-ramon-machado-avancojn-de-la-kuba-sansistemo

# Radio Habana Cuba